9ª Jaro 1912. ★ Decembro 1912.

Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanto.
(Joh., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

## La Senpartieco.

Kara Redaktoro,

E. K. estas serioza Revuo, tamen ne estas, laŭ la latina poeto, malpermesate, kelkfoje: „ridendo dicere verum": „ŝercante diri veraĵon". Mi do antaŭ ne longe ricevis belpresitan cirkuleron el Svisujo, varme invitantan min partopreni en la kreado de „Bureau de la langue internationale".

Oni, per tiu cirkulero, certigis al mi, ke la Komitato decidis montri „la neŭtralecon la plej absolutan pri ĉiuj projektoj de internacia lingvo".

Nu, mi rimarkis, ke la du Vic-prezidantoj de tiu Komitato estas S-roj Ostwald kaj Waltisbühl, kaj la Sekretario, kiu estas, ŝajne, la animo de la afero, estas la Protestanta Pastor' Schneeberger. Viaj legantoj scias sendube, ke tiuj tri Sinjoroj estas la plej agemaj el Idistoj, kiuj neniam perdas la okazon por antaŭenpuŝi tiun plagiaton de Esperanto. Plue, por bone elmontri la celon kaj la elvenon de la cirkulero, la pastra Sekretario havis la, laŭ mi, singardemecon presigi sur la koverto vorton de la Id-lingvo: „*Imprimuro*".

Mi do respondis, ke mi plezure aliĝus la Asocion kaj

iĝus subtenanta membro, paganta cent frankojn, se ili volus konsenti fari *etan* ŝanĝon en la estraro de la komitato. Mi aldonis, ke la mondo estis tiel suspektema, ke eble, kelkaj povus suspekti la „absolutan senpartion” de tiuj 3 sinjoroj. Mi do proponis, ke oni nomu kiel Vic-Prezidantojn Doktoron ZAMENHOF kaj Generalon SEBERT, kaj kiel Sekretarion S-ron T. CART, jen tri scienculoj tiel kapablaj kaj egale senpartiaj kiel S-roj OSTWALD, WALTISBÜHL kaj SCHNEEBERGER.

Plue, mi esprimis la deziron, ke oni ne komencu uzi la lingvon, kiun oni evidente *jam* decidis elekti, almenaŭ antaŭ la kreado de la „Bureau”, kiu pretendas devi elekti ĝin. ARO.

## Aldono.

Kelkajn tagojn post la sendo de tiu-ĉi letero mi ricevis respondon, ne de S-ro D-ro GOBAT, al kiu tamen mi sendis „personan” leteron, sed de la Protestanta Pastro S-ro SCHNEEBERGER, kiu ŝajnas esti la sola oficiala aganto en la tuta afero. Mirigite mi rimarkis, ke tiu letero estis en Esperanto!

Mi respondis france, ne al Pastro SCHNEEBERGER, kiun mi nur konas nome kiel militantan Idìston, sed al S-ro D-ro GOBAT, kun kiu sole mi deziras interrilati. Jen la resumo de mia respondo, kiu sufiĉe sciigos al niaj legantoj la enhavon de la Esperanta letero.

Mi skribis do al S-ro D-ro GOBAT, ke mi bone scias Esperanton, tamen mi ne sekvus la ekzemplon de S-ro SCHNEEBERGER, tial ke laŭ mi estas apenaŭ delikate „in casu” jam uzadi lingvon artefaritan pri la kreado de „Bureau”, kiu almenaŭ pretendis elekti tian lingvon „kun „la plej absoluta neŭtraleco”.

2e. Mi notigis la subtilan diferencon inter Komitato starigita por elekti internacian lingvon, kaj „Bureau” nur starigita por havigi komitaton elektontan ĝin. Tamen mi esprimis la deziron scii, supozante ke la Esperantistoj estus starigintaj similan „Bureau”, kies Prezidanto estus D-ro ZAMENHOF, la du Vicprezidantoj D-ro BOIRAC kaj

Generalo SEBERT, kaj la Sekretario S-ro CART, ĉu la Idistoj akceptus tian „Bureau", eĉ se oni certigus al ili, ke la elekto de la lingvo okazus kun la plej absoluta neŭtraleco? Mi aldonis, ke kompreneble tia supozo estus absurda. D-ro ZAMENHOF kaj siaj amikoj estas tro delikataj por fari tian proponon kaj ili havas tro da respekto por siaj kontraŭuloj por proponi ĝin al ili.

3e. Mia korespondinto certigis al mi, ke je la komenco de la afero oni prezentis al D-ro ZAMENHOF kaj al aliaj Esperantistoj esti Vicprezidantoj „apud la Idistoj". Mi respondis, ke mi ne bone komprenis, kial ĉe komitato, „absolute neŭtrala" nur anoj de *du* lingvaj sistemoj devus aperi. Cetere mi bone komprenis, kial tiuj Sinjoroj rifuzis, same kiel mi komprenas, kial eĉ malsaĝa birdo ne eniras kaptilon senkaŝe al ĝi prezentitan.

4e. Pri la klarigo, ke la presigo de la idista vorto „imprimuro" estis nur la faro de oficistino, mi respondis, ke kompreneble mi ne pensis, ke sinjoro, tiel „malin" kiel S-ro SCHNEEBERGER, intence uzis tiun stampilon. Mia motivo estis nur altiri la atenton al la deveno („à la boite") de la tuta korespondado. Kompreneble Sekretario tute neŭtrala ne havas sur la skribtablo ĉirkaŭ si stampilojn k. t. p., kies nura celo estas helpi al la propagando de la lingvo Ido.

Mi finis dirante, ke malgraŭ la althonoreco de la membroj, la nomita Asocio havas evidente nur unu celon, t. e. la elekton de Ido kiel la estontan internacian lingvon.

Mi nur esprimas la deziron, ke la respektinda Direktoro de la Svisa Pacifisma Ligo ne daŭrigu pruntdoni sian honoran nomon al afero tute ne inda je lia bonfamo, ne nur en Svisujo, sed ankaŭ ĉe la amikoj de la Paco en ĉiu lando.

A. RICHARDSON.

## Mallonga Resumo de la elokventa Parolado de Mgr. D-ro Giesswein pri La Pacifismo, dum la 3-a Katolika Kongreso en Budapest, Aŭgusto 1912.

---

La temo de la klera oratoro sekvis la principojn de la tradicia Teologio de la Eklezio, laŭ la skribaĵoj de la S-taj Patroj kaj de la specialaj epistoloj de la tri lastaj Papoj: Pio IX-a, Leo XIII-a kaj Pio X-a. Jen la epitomo de la parolado: „Ni ne neas la leĝitimecon de la milito, „in se", sed ni pretendas, ke ĝi estas permesita nur kiam ĝi iĝas necesa por defendi justan kaŭzon.

Krom tio, ĝi estas la plej terura krimo.

Prava estas defendi sian vivon, kaj eĉ kelkfoje siajn posedaĵojn, mortigante la maljustan atakanton, kondiĉe ke neniu alia rimedo por sin defendi ekzistas.

En landoj, kie regnas nur primitiva vivostato, tiaj personaj bataloj estos ne eviteblaj: sed ĉe ĉiuj civilizitaj landoj la normala maniero por decidi disputojn inter civitatanoj, estas la alvoko al tribunaloj starigitaj precize por tiu celo. Ĉiufoje ke estas eble sin turni al tiuj tribunaloj, bataloj inter individuoj estas malpermesataj kaj severe punataj.

La Pacifistoj pretendas ke, dank' al la progreso de la civilizacio, kaj al la pli granda dolĉeco de la moroj, oni grade konsideru je pli malmulte da admiro, la militistan kuraĝon. Oni komencas preferi al ĝi la kuraĝon multe pli noblan de tiuj herooj, kiuj oferdonas sian vivon, ne por mortigi, sed por savi la vivon de siaj gefratoj. La deziro decidi la disputojn inter nacioj, sammaniere kiel oni de post multaj jarcentoj decidas la disputojn inter personoj, tute ne estas „Utopio", male, ĝi estas racia kaj tre realigebla. La hommoroj ŝanĝas, dank' al Dio. La Progreso ne estas nur vana vorto. Ekzemple, antaŭ cent jaroj oni estus elĵetinta kiel utopion la ideon, ke estus iam eble, forigi la duelon kiel rimedon por decidi disputojn pri la honoro inter „ĝentilhomoj." Tamen ĉu ni ne povas hodiaŭ antaŭvidi ke, sen iu dubo, antaŭ ne longe la duelo estos forigata en ĉiu civilizata lando? Jam ĉe la plej progresemaj landoj ekz.: en Anglujo kaj Usono tiu barbara kutimo ne

plu ekzistas kaj en la plej multaj el aliaj landoj oni komencas konsideri la duelon kiel absurdaĵon aŭ krimon. La Pacifistoj kredas en la progreso; ili rifuzas kompari la homojn, siajn fratojn, kreitajn de la sama Dio, reaĉetitajn per la sankta Sango de la sama Savinto, al la bestoj senraciaj. Ili ne pretendas, kiel mokante diras iliaj kontraŭstarantoj, ŝanĝi tuj la tutan homan rason. Tute ne, sed ili ja pretendas, ke estas la devo de ĉiu kristano, de ĉiu honesta homo sekvi la admonojn de nia S-ta Patro la Papo, de tiom da Episkopoj kaj Pastroj de Dio kaj dissemi, disvastigi pli kaj pli la verajn principojn. Tiel, oni sukcesos pli malpli fine, decidigi la grandajn naciojn de la mondo starigi internacian senpartian tribunalon, kiu havus la plenkonfidon de ĉiu. Tia tribunalo povus per arbitracio decidi ĉiujn disputojn inter la nacioj, tiel kontenti la honoron de ĉiu, kaj igi la militon, kiu estas ĉiam malcerta kaj ĉiam kruelega, tute ne necesa. (El Belga Katoliko.)

---

# „AL ROMO”.

---

Sukcesplena estis nia Tria en Budapest, sed laŭ mi, la plej bela rezulto de la Kongreso estis la unuanima decido de la kongresanoj dediĉi la jaron 1913an al internacia Pilgrimado al Romo. Certe, ne estis la intenco de la voĉdonantoj ne okazigi dum tiu jaro la kongreson. Ho ne: dum la daŭro de la Pilgrimado la I. K. U. E.-anoj trovos la necesan tempon por kunveni, kaj por okazigi nian „KVARAN” inter la muroj de la Eterna Urbo; sed nia Katolika Esperantista manifestado la proksiman jaron, havos signifon multe pli ampleksan ol simpla kongreso. Ni volas montri al la mondo, kaj precipe al nia komuna Patro, Lia Papa Moŝto, al la Episkoparo kaj al la tuta Katolikaro, ke nia movado havas nur unu finan celon, t.e. servigi tiun potencan ilon, la Internacian Lingvon, je la bono de la Regno de Dio sur la tero, alivorte, je la Krista Eklezio. Por ni, Esperanto ne estas celo, sed rimedo. Nia manifest-

ado ne estos la unua internacia pilgrimado, ho ne, ĉiun jaron okazas internaciaj pilgrimadoj al Romo, Jeruzalemo, al Lourdes, k.p.t. sed ni faras alvokon al ĉiu, kiu ĝis nun partoprenis en katolikaj pilgrimadoj, ke ili diru al ni, ĉu ne io ĉe tiuj piaj aroj mankis je la vidpunkto de la internacieco ? La gepilgrimantoj estis ja personoj el diversaj nacioj, ili parolis per diversaj lingvoj, france, angle, germane, Nederlande k.t.p. Sed la interrilatoj inter la diverslandaj pilgrimantoj estas maloftaj. Kelkaj el la Anglaj kaj el la Germanaj eble parolis france, kaj reciproke, sed estis escepto. La plimulto sciis nur sian patrinan lingvon, kaj pro tio, rilatis preskaŭ ĉiam nur kun siaj samlandanoj. Certe dum la Diservoj, precipe en la Sankta Festeno de la Eŭkaristio, ili ĉiuj intime interrilatis, ĉar ili ĉiuj ricevis la saman „*Panem de coelo*" kaj iĝis unu en Kristo. Sed tio estas nur unuiĝo spirita kaj anima. Belega unuiĝo sendube, kaj kiu bone elmontras la esencan Unuiĝon de la Sankta Katolika Eklezio, sed mankis la rimedo de komuna lingvo por, ke ili ĉiuj povus interrilati ne nur kore, sed buŝe. Nia Esperantista Roma Pilgrimado, jen nia espero, elmontros al la tuta Katolikaro *sperte,* per videbla pruvo ke, estonte, ĉiu granda Katolika Agado povus iĝi vere internacia. Ĝis nun en ĉio la Katolikoj starigis societojn por la defendo de la Eklezio, por la unuiĝo de la Kristana gejunularo, por la sociala plibonigo de la laboristoj, por la defendo de la junulinaro k. t. p., sed tiuj bonaj societoj estas nur naciaj, aŭ ne sufiĉe internaciaj, pro la barilo de la diverseco de la lingvoj. Niaj kongresoj kaj precipe tiu tutmonda Pilgrimado elmontros, ke tiu barilo praktike ne plu devus ekzisti. Ne forgesu, ke jam kiel katolikoj, ni estas membroj de unu tutmonda familio : la familio de la infanoj de Dio sur ĉi tiu tero. Niaj interesaĵoj estas komunaj. Malfacile estas imagi la potencon de la Katolikaro en la mondo, se la centmilionoj da niaj kunreligianoj povus interrilati kaj interagadi dank' al sama internacia lingvo. La malamikoj ne volus, facilanime, sin trovi kontraŭ la tutmonda aro de unuigata Katolikaro, kapabla

interrilati kaj sin interhelpi je maniero eĉ ne revita gis nun.

Sed por ke nia provo estu konvinkanta, necese estas ke nia estonta pigrimado estu multnombra. Ke ĉiu Katolika Esperantisto faru sian devon, unue formante jam la decidon partopreni, kaj due fervore kaj ageme klopodante por decidigi multajn aliajn gekatolikojn akompani nin. Ne estas necese, ke ili estu jam lertaj esperantistoj, sufiĉas ke ili aprobu la ideon de internacia lingvo. Cetere, restos antaŭ la monato Septembro 1913 larĝe sufiĉe da tempo, por ke ĉiu povu lerni Esperanton kaj interparoli kun alilandaj kongresanoj. Oni petas la Belgajn Katolikojn sin turni al Abato Richardson, 121, Rue du Marais Bruselo, por haviĝi ĉiujn detalojn pri la Pilgrimado, prezo de biletoj, loĝejoj en Romo k. t. p. Geamikoj, alvenu Romon, kaj alvenu multnombraj.

(El „Belga Katoliko”.)

---

# PLI PROKSIMAJ KAŬZOJ DE LA MALKREDO.

(Lasta ĉapitro el libro s. t. „Defendo de Katolika Kredo” verkita de pola episkopo D-ro Jozefo Sebastiano PELCZAR en Przemys'l (Galicio - Aŭstrio).

---

**Enhavo.** Difino kaj genezo de la kredvirto. - La agadsfero de l' intelekto en ĉi tiu afero. - Malfacilaĵoj el flanko de religio mem. - Kial la pasioj kaj precipe la fiereco, sentamo (sentvoluptemo) kaj malamo estas la malamikoj de la religio? - La nescio de la religio kaj la indiferenteco rilate al ĝi. - La malplenumo (neglekto) de la religiaj praktikoj kaj ĝiaj fontoj. - Manko da religia entuziasmo. - Alvoko por konservi kredon, kaj rimedoj por ĝin reakiri.

---

Nepriŝatebla trezoro por la homo estas la klara, humila, forta kaj viva kredo; sed ĉu facile estas havigi al si tian kredon, se oni ĝin ne posedas jam de juna aĝo, aŭ hav-

igitan al si konserve reteni, aŭ perditan reakiri? Ne! tio ne estas facila! alie la kredo posedus nek tian valoron, nek tian meriton ĉe Dio! — Ĉar kio estas al kristano la katolika kredo? Ĝi estas la supernatura virto, enverŝita de Dio mem, per kies pero la homo, apogita sur aŭtoritato de Dio mem, rekonas ĉion kiel veron, kion Dio estas rivelinta, kaj kion la katolika Eklezio kredigas al li. Evidentas do, ke ĝi estas la kreskaĵo devenanta de la supernatura mondo, kreskaĵo, kies semon Dio semas en animon dum ĝia baptiĝo, poste ĉi tiu semo per helpo de viviga lumo de la graco, instruo de Eklezio kaj kunagado de l' animo fariĝas elkreske la bela kaj fruktodona spiko. — Ĉiu akto de la kredo ĉe katoliko, kaj la komenco de la kredo ĉe la nenaskiĝintoj sur sino de Eklezio, aŭ la reveno al ĝi ĉe tiuj, kiuj estas ĝin perdintaj proprakulpe, estas la produktaĵo de l' intelekto, volo, kaj Dia graco; ĉar por kredi estas necese ekkoni per intelekto la rivelitan veron kaj inklinigi la volon por akcepti ĉi tiun veron; ĉar ree la kredo estu la supernatura virto, estas bezona krom tio la Dia graco, kiu lumigas la intelekton kaj helpas la volon. — Kaj kio estas la impulso por kredi? Ĉu ekzameno de propra intelekto aŭ atesto de aliaj homoj? Ne! sed la aŭtoritato de Dio mem, de la esenca Vero, kaj plej alta Saĝo t. e. ke estas necese kredi pro tio, ĉar Dio mem ordonas kredi, ke Li estas rivelinta al ni la kredobjekton! Sed kiu instruas nin pri la fakto kaj objekto de Dia rivelitaĵo? *La Katolika Eklezio,* kiu estas la atestanto, gardisto kaj instruisto de la rivelita vero, kaj la Eklezio *verigas sian mision per nerefuteblaj pruvaĵoj.* Same kiel antaŭ reĝo marŝas heraldoj anoncantaj lian alvenon, tiel antaŭ Eklezio marŝas multonombraj atestoj, verigantaj ĝian Dian originon kaj nome:

1-e la sanktaj libroj de la Malnova kaj Nova Testamento;

2-e efektivigitaj profetaĵoj;

3-e grandaj mirakloj akompanantaj ĝin dum la dudek centjara daŭro;

4-e sublimeco de ĝia instruo;

5-e sankteco de ĝia leĝo;

6-e ĝia rapida disvolviĝo sen konvenaj rimedoj;
7-e mirigaj fruktoj;
8-e ĝia neŝancelebla daŭrado malgraŭ persekutadoj, kaj
9-e Dia forto montriĝanta en suferadoj de ĝiaj Martiroj kaj en heroaj virtoj de ĝiaj Sanktuloj. —

La homa intelekto ne estas en ĉi tiu afero nur pasiva ilo, sed ĝi havas vastan agadsferon; ĉar ĝi povas per propra esplorado pruvi la kredfundamentojn t. e. ĉi tiun metafizikan veron, ke Dio ekzistas, ke Dia rivelitaĵo estas ebla, kaj ke la homo povas posedi moralan certecon pri la vereco de ĉi tiu rivelitaĵo — krom tio ĝi povas pruvi la historian veron, ke efektive Dio estas riveliĝinta, ke Jezu-Kristo estas Dio, ke katolika Eklezio estas la dia, ĉar fondita de Jezu-Kristo; ĝi povas ankaŭ pruvi la konkordecon de la rivelitaj veraĵoj kun logikaj kaj metafizikaj principoj, dedukti el ĉi tiuj veraĵoj la tre mirindajn instruaĵojn kaj kunmeti ilin en iun tuton (sistemon).
— Tiel procedadis grandaj filozofoj, teologiistoj kristanaj; kaj ĉi tiu esplorado entreprenita konscience kaj humile, alkondukadis unujn al Eklezio kiel ekzemple Sanktan Justinon aŭ Sanktan Aŭgustinon, la aliajn ree konfirmadis aŭ konfirmas en Kredo.
Kontraŭe, kiu ne volas ekkoni katolikan instruon, aŭ esplorante ĝin, subiĝas al pasioj aŭ antaŭjuĝoj, tiu devas aljuĝi al si mem la kulpon, ke li eraras, aŭ nenion kredas. Simile kiu ne preĝas por ricevi la supernaturan lumon, kaj okaze de la aperantaj duboj ne konsultas la pli klerajn homojn, precipe pastrojn, ne aŭskultas la predikojn, ne legas la apologiajn librojn, ĉi tiu ne povas sin senkulpigi. En ĉiuj ĉi tiuj okazoj la malkredo estas kulpporta.

— Por memstare esploradi la kredfundamentojn, ne multaj posedas bezonajn kondiĉojn, ĉar ĉi tio estas la afero precipe de tiuj, kiuj dediĉas sin al la teologio; anstataŭe, la treega plimulto da katolikoj konfidas tute al la instruanta Eklezio, kiel posedanta de Sankta Spirito la donacon de la neerarebleco, kaj ĝi kun tia trankvilo akceptas ĝian

instruon, kun kia la infano suĉas lakton el mamo de sia patrino. . . . . Tamen ne ĉiuj estas tiel animagorditaj kaj jen ĉi tie estas la unua *malfacilaĵo devenanta de religio mem.* Ĉar kiu reprezentas la instruantan Eklezion? La Papo kun episkopoj, kiun helpas en la instruado la sacerdotoj — do *la homoj!*, estaĵoj regataj de malaj inklinoj kaj malvirtoj! Okazas do ne malofte, ke tiu aŭ alia pastro ne vivas tiel, kiel li instruas, aŭ ke li pro la malbona vivo eĉ perdas kredon. Prudentaj katolikoj doloras pro tio, sed ne malboniĝas pro tio, sciante, ke en Eklezio la Dia elemento nedivideble kunplektiĝas kun homa elemento, ke Dia elemento konsistanta el vero, leĝo, graco kaj aŭtoritato estas senmakula kaj nedifektiĝebla, dume la homa elemento konsistanta el homoj predikantaj la veron, leĝon, distribuantaj la gracon, okupantaj la aŭtoritaton povas submetiĝi kaj kelkfoje submetiĝas al parta difektiĝado. Sed ĉi tiu difektiĝo ne malgrandigas respekton por sankteco de Eklezio, kiu, malgraŭ tio, plenumas ĉiam sian grandan mision. Eĉ ĉi tio estas la pruvo de ĝia Dia signo, ke ĝin sukcesas detrui nek malamikoj nek malbonaj filoj. Cetere ne multaj estis, nek estas, ĉi tiuj malbonaj filoj inter pastraro; krom tio ne decas kalkuli pastrajn malbonaĵojn je konto de la tuta pastra stato, same kiel estus malprudente aljuĝi la pekojn de Johano XII aŭ Aleksandro VI al tuta paparo. Ekzemple: kiu kuraĝus neniigi oficojn kaj nomi ĉiujn oficistojn ŝtelistoj pro tio, ke unu aŭ alia oficisto faras trompo-kalkulojn? Cetere, kio estas la maldecaĵoj de malmultetaj individuoj rilate al brilegantaj virtoj kaj sindonitaĵoj de katolika pastraro plenumitaj dum daŭro de dudek jarcentoj? Dume la facilanime pensantaj aŭ malbonvolaj homoj donas al tuta stato la respondecon pro tiuj unikuloj; kaj kio estas pli malbona, ili konkludas egale senprudente kiel maljuste, ke ĉi tiu Eklezio ne povas esti la Dia, se ĝi posedas tiajn sacerdotojn, — ke la instruo, kiun ĝi predikas, ne estas la vera.

La instruanta Eklezio ankaŭ pro tio havas malamikojn, ke ĝi ĉe la aliaj religioj predikas dogmon, ke *ĝi sole, unike posedas la tutan veran kaj sendanĝeran vojon konduk-*

*antan al animsavo* — ke ĝi eligas el sia sino ĉiujn, kiuj disvastigas herezon, skismon, aŭ ribelon kontraŭ Eklezia aŭtoritato — ke ĝi ne intertraktas kun malbonaj opinioj de la tempo, kaj ke ĝi pro utilportaj kunsideroj ne forlasas siajn dogmojn aŭ fundamentajn leĝojn, eĉ se ĝi estus perdonta tutajn regnojn kaj naciojn (kiel tio okazis dum regado de Henriko VIII) — ke ĝi defendas kontraŭ „cesarismo" aŭ revolucio sian sendependecon kaj religian liberecon, ne cedante eĉ al la malkaŝa persekutado. Sed kiu el prudentaj homoj ne komprenas, ke Eklezio ne povas alie procedadi!

Kelkajn katolikojn ofendas ankaŭ tio, ke katolika *Eklezio havas tiom da nerepaciĝeblaj malamikoj, kaj ke ĝi tiel ofte suferas de ili premadon kaj humiligadon;* dume ili volas ĝin vidi ĉiam potenca, ĉiam triumfanta, ĉiam ĉirkaŭita per mondana gloro. Sed ĉi tiuj homoj „de malgranda kredo" forgesas, ke Jezu-Kristo estas savinta la mondon per kruco t. e. per la plej granda humiliĝo, kaj ke la kruco, kiu al idolanoj ŝajnis esti „malsaĝaĵo" kaj al hebreoj „skandalo" venkis la malamon de hebreoj, la saĝon de filozofoj, kaj potencon de „cezaroj." Krom tio Jezu-Kristo volis, ke Lia Eklezio „kreskadu per humileco" kiel ĝuste diras Sankta Gregorio Granda, kaj ke ĝi kun kruco de doloroj kaj humiliĝoj grimpadu post Li sur Golgotan; sed ĵus per forto de ĉi tiu kruco la Eklezio akiras brilegajn triumfojn super siaj persekutantoj, tiel, ke en ĉiu epoko veriĝas la frazo de Tertuliano; „Mori possumus, vinki non possumus". (Ni povas morti, sed ni ne povas esti venkitaj.)

Kiom da malamikoj en daŭro de jarcentaro kontraŭ-bataladis Eklezion! unue la hebreismo, kaj idolismo, poste herezaro, kaj skismaro, plue kelkaj orientaj okcidentaj imperiestroj, pli poste reformacio, malkaŝa malkredo, revolucio kaj cezarismo — kaj Eklezio estas venkinta ĉiujn! Tio ĵus estas, kio devigis eĉ la protestantojn kiel ekz. SCHILLER, MACAULAY, PAULSEN kaj aliajn esprimi sian miregon,[1])

[1]) Frideriko PAULSEN en sia verko „Philosophia militans", Berlin 1901, paĝon 65, skribas jene: „La papismo alproksimiĝis al sia

kaj ankaŭ tio precise estas diktinta al sankta Chrisostomo ĉi tiujn ekstazplenajn vortojn, *„ke oni pli facile povas detrui ĉielojn ol Eklezion!"*

Al iuj senpripensemaj homoj *kreas malfacilon la misteroj mem de la katolika kredo*, kvankam ili postulas de la homo la „racian obeon" (Sankta Paŭlo al Romanoj XII: 1), kaj ne blindan neiĝon de l' intelekto. Nome: tiu kaj alia, mezurante Dion per propra ulno, ne volas ekkredi, ke Dio estas tiel ekaminta mondon, ke Li donis propran Filon Unikan, ke ĉi — Li mortu sur kruco por savi homojn, kaj ke ĉi — Li restu inter ili en Sakramento de l' Altaro, do precize tio forpuŝas la egoistan homon, kio lin devas altiri al Dio; dume la demoralizitan homon malproksimigas de kredo la dogmo pri infero, pro tio, ke li volas, ke la infero ne ekzistu.

Alia koleras kontraŭ Dia Providenco pro tio, ke *Ĝi permese sendas la malvenkojn kaj malfeliĉojn* sur individuojn, familiojn, naciojn kaj ŝajnas al li, ke se li estus dio, li pli bone regus la mondon.

Troviĝas inter katolikoj kaj des pli inter alikreduloj ankaŭ *tiuj, al kiuj ne plaĉas kelkaj piaj praktikoj uzataj en Katolika Eklezio* kiel ekz. recitado de rozario, portado de skapulario, piaj pilgrimadoj, benadoj, k. t. p.; pro tio ili malestimas ilin, kaj eĉ akuzas Eklezion pri disvastigado de superstiĉo. Dume ĉi tiuj praktikoj, se oni ilin nur komprenas kaj akceptas tiel, kiel instruas Eklezio mem, enhavas tiom da profundaj pensoj kaj alportas tiom da dolĉaj konsoloj, kaj povas venigi tiom da spiritaj gracoj, ke ili estas ne malgranda trezoro por homoj sufiĉe klerigitaj en

---

celo t. e. al regado super la mondo, tiamezure, ke malantaŭe je unu jarcento tio ŝajnus esti nekredebla. La neerarebla Papo regas ne nur Eklezion kun ĝia pastraro kaj monaĥaro kaj sen ia interna rezisto kontraŭ si, sed li tiel forte influas sur pensojn de laikuloj kaj precipe kleruloj inter laikularo, kiel neniam antaŭe." „La rimedo - daŭrigas PAULSEN - por certigi al si ĉi tiun influon estas la katolika-eklezia instruo, kaj katolika-eklezia presaro, precipe la neotomistika filozofio, dume la protestanta filozofio troviĝas en stato de l' anarkio."

kredo. Eklezio altrudas ilin al neniu, kaj ne aljuĝas al ili tian valoron, kian posedas la dogmoj de l' kredo, la sanktaj sakramentoj, kaj etikaj principoj. Ke iuj malĝuste uzas ĉi tiujn praktikojn, devenas el tio, ke ili ne posedas pri ili ĝustan imagon. Cetere la superstiĉo okazas ne nur inter kredularo, sed ankaŭ inter malkredularo kaj eĉ ĉe tre progresema, ĉar ni konstatas, ke ĵus inter ili la buddismo, spiritismo, okultismo kaj aliaj erariĝoj troviĝas fanatikaj adeptoj.

Tamen plej multaj homoj indignas kontraŭ katolika religio pro tio, *ke ĝi postulas la konsciencan submetiĝon* (de l' homo) *al Dia kaj Eklezia leĝo* — ke ĝi surmetas severajn devojn, — ke ĝi ordonas bridi sentvoluptemon, fasti, fari konfeson de la pekoj, — ke ĝi kondamnas pekojn eĉ pensajn kaj dezirajn; ĉar ĉi tie religio renkontas ne nur malklerecon kaj falsaĵojn de l' intelekto, sed ankaŭ mallaboremon kaj perversecon de la volo t. e. *la pasiojn.* — La pasioj estis, estas kaj ĉiam estos la obstinaj malamikoj de la religio kaj tio ne estas stranga; ĉar *religio* ne estas ia abstrakta teorio aŭ filozofia sistemo sed ĝi *estas la leĝo de la vivo por individuoj kaj por la socio,* kaj kiel tia ĝi enpenetras en la plej profundajn kaŝejojn de la homo, ĉirkaŭprenas la tutan ĝian esencon, metas sur lin la devojn, postulas de intelekto homagion, de koro amon, de volo obeon, ĝi proklamas sindetenemon, kondamnas eĉ penson malbonan, ordonas ami eĉ malamikojn. Dume: la homo ne ŝatas humiliĝi, ne toleras jugon ian ajn, abomenas batalon kun si mem, volonte cedas al maldiligenteco kaj regas sin per egoismo; do se li sekvas siajn pasiojn, li facile indignas kontraŭ religio, kiun li tiuokaze konsideras kiel katenon por sia spirito kaj kiel atencon kontraŭ sia libereco.

Do eĉ se la religio ekprezentus antaŭ liaj okuloj ĉiujn siajn pruvojn en tuta brilo, tamen la volo submetiĝinta al pasioj, — aŭ kiel oni diras — la koro morale difektita ne permesas al intelekto konsideri ilin (pruvojn), sed kontraŭe ĝi ordonas al li serĉi riproĉojn eĉ ŝajnajn, eĉ sofis-

mojn (trompajn argumentojn), por nur seniĝi de la malagrabla vero.

Do ĝuste diris De Bonald, ke, se el ĉi tiu geometria principo, ke tri anguloj de la triangulo egalas al du rektaj anguloj, estus elfluonta ia devo, certege oni penadus dubigi pri ĝi! „En homa volo, en egoismo, en fiereco, en vanteco, sentvoluptemo kaj maldiligenteco oni devas serĉi kaŭzon de la plej multaj eraroj de l' intelekto" (Döllinger en verkoj: Irrthum, Zweifel, Wahrheit, München 1845). Belaj ankaŭ estas vortoj de Fichte: „Unser Denksystem ist oft nur die Geschichte unseres Herzens" (Die Bestimmung des Menschen). — Se ni tamen volas atingi la fonton mem, ni devas ripeti kun granda saĝulo St-a Aŭgustino, *ke ĉiu eraro devenas ėl peko*. Kiam Apostolo St-a Paŭlo komencis antaŭ starosto Felico, homo koruptema kaj sentvoluptema, paroli pri la justeco, ĉasteco kaj Dia juĝo, ĉi tiu ektimis kaj ne volis lin aŭskulti; simile ankaŭ hodiaŭ la vero estas por multaj la abomena mentoro, kaj pro tio ili ŝtopas kontraŭ ĝi siajn orelojn, kaj penas konvinki sin mem, ke ĉio estas mensogo. Kio do estas bezona por fariĝi malkredulo?

Ĉu intelekto, ĉu scienco, ĉu forta karaktero?

Ne! sed sufiĉas sekvi pasiojn, kiuj estas al ni agrablaj, kaj kiujn kondamnas religio (Frayssinous: „Defendo de Kristanismo." T. IV, paĝ. 120 traduko pola). Kaj kion oni devas fari por fariĝi kredulo? Antaŭ ĉio oni devas bridi pasiojn, kiel rekonis tion (kvankam ne faris tion) la geneva filozofo J. J. ROUSSEAU, dirinte: „Ho filo! konservu ĉiam vian animon en tia stato, ke vi deziru al vi, ke Dio ekzistu, kaj vi ne dubos pri Lia ekzistado."

Inter pasioj la plej danĝeraj estas *la fiereco* [2]) kaj *sentvoluptemo* (malĉasteco).

Religio kontraŭe ordonas al intelekto humiliĝi antaŭ la

---

[2]) La fiereco ordonas al homo kredi en sian propran neerareblecon, malestimi lumon de aliaj (homoj), ne rekoni super si la superan aŭtoritaton, enprofundiĝi kun malluma lampeto de sia intelekto en tordan labirinton de esploroj kaj venigi religion antaŭ sian juĝon, kaj poste forĵeti tion, kion ĝi ne povas kompreni.

lumo de Dia rivelo, kredi neesploreblajn misterojn, obei doktrinojn de la instruanta eklezia aŭtoritato, en vivo ree peti senĉese helpon de Dio, esti fiera super neniu kaj konfesi siajn pekojn eĉ plej sekretajn ĉe sacerdoto; do ne estas mire, ke fiereco ne povas interkonsentiĝi kun religio, kaj ĝi estas la fruktodona patrino de herezaro, erararo, apostataĵaro. Ĝi precise enprofundigis hereze tian Tertulianon, Arion, Huson, Luteron, Lamennais'on, Döllinger'on kaj tiom da aliaj luciferoj. Hodiaŭ regas en mondo la fiereco de l' intelekto, narkotita per tiom da konkiraĵoj sur la scienca kaj industria kampo. — Kaj ankaŭ regas la fiereco de la volo toleranta nenian jugon; do ne estas mire, ke tiom da animoj deturnas sin de la religio.

Kun fiereco de l' intelekto kaj resultanta el ĝi, obstina tenado de sia opinio ofte marŝas kune kun la deziro esti originala kaj diferenciĝi en opinioj pri scienco, leĝo kaj vivo de la Eklezio, eĉ tute kontraŭaj al la verdiktoj de la plej supera gardanto kaj majstro de la rivelita vero; kaj precise ĉi tio estas la fonto de racionalistaj teorioj de tiu Hermes, Günther en XIX jarcento, kaj modernistoj kaj pseŭdoreformistoj de tiu Schell, Loisy, Minocchri, Murri, Tyrrell, kaj aliaj en XX jarcento. — Ekster la sciencularo inter ordinaraj kristanoj okazas sufiĉe ofte, ke tiu aŭ alia, sentante ofendon kontraŭ ia pastro pro la de li kaŭzitaj malagrablaĵoj (ofte nur imagitaj), ne vizitas preĝejon, en kiu povus sin renkonti kun tiu pastro, kaj malplenumas religiajn praktikojn — kaj kio estas pli malbona, ke li malamike animagordiĝas kontraŭ tuta pastraro, kaj komencas malestimi la religion mem, kaj tiamaniere malkreduliĝas ne tiel en teorio, kiel en praktika vivo.

Estas, ankaŭ spertite, ke la malamo, kaŭzata per bataladoj de partioj, tre facile transportiĝas el politika aŭ sociala kampo sur religian kampon. Ekzistas homoj precipe en radikala kaj socialista partioj, kiuj antaŭ ĉio pro tio kontraŭbatalas religion, ke la pastraro apartenas al kontraŭa rondo, kaj ke ĝi kontraŭbatalas iliajn celadojn; kaj tio precise estas la ĉefa kaŭzo de persekutadoj, kiujn revolucio preskaŭ ĉie iniciatas kontraŭ Eklezio. Tio ankaŭ

klarigas al ni, kiamaniere la protestantaj pastoroj povis dum jaroj de 1900—1908 sub devizo „Los von Rom” varbi al si 40.000 da apostatoj inter aŭstriaj germanoj; jen helpis ilin ne nur religia indiferenteco kaj prusa mono, sed ankaŭ la politika frenezeco. [3])

Ĉe la junularo la plej danĝera malamiko por ĝia kredo estas la *sentvoluptemo.* Kiam gi ekregas homon, tiam ĝi forbruligas en koro ĉion, kio estas nobla kaj ĉasta, [4]) al intelekto ree ĝi surĵetas kurtenon, ke ĝi ne vidu Dion kaj Lian leĝon kaj enfine pensigas ĝin, ke la korpo estas la unika diaĵo, kaj la sentvolupto la unika vero. [5])

Rigardu junulon, kiu avide trinkas el venenita pokalo de la sentvoluptemo, kiel li narkotita forgesas unue pri ĉiutaga preĝo, ne vizitas preĝejon, evitas konfesejon, poste elserĉas riproĉojn kontraŭ kredo, por eniĝi de ĝiaj altrudemaj admonoj, fine li blasfemas cinike, kaj mokegas pri tio, kion li antaŭe estimis kaj timis. Eĉ kiam la pasio en li kvietiĝas, restas post ĝi detruopostsignoj; kaj same kiel la estingiĝintaj vulkanoj anstataŭ lafo elĵetas volvaĵojn de nigra fumo, tiel la koro difektita morale en junaĝo, ankoraŭ en maljunaĝo elĵetas fumon de la sena-

---

[3]) Tiel ekz. iu nombro da universitataj studentoj en Vieno kaj Graco, kompreneble nenion kredantaj, aliĝis al la lutera sekto nur pro malamo al Slavoj! — En Wyszkow ree, en Moravujo, 150 katolikoj-germanoj alprenis protestantan religion nur pro tio, ke parohestro de ĉi tiu paroho havis kontraŭan opinion rilate al la okupigo de la instuista posteno en popola lernejo!

[4]) Cicero citinte la vortojn de Arctitas en Torente diras: „Nenio estas tiel abomena kaj pereiga kiel la sentvoluptemo. Se ĝi estus pli forta aŭ pli longdaŭra, ĝi sukcesus estingi tute la lumon de la spirito” — kaj daŭrigas tiel — „ĝi kiel malamiko de l' intelekto malhelpas konsideron, malheligas la okulojn de l' intelekto, kaj ne povas interkonsentiĝi kun virto.” (De sancctote XII, 41). Plato komparas homan snbmetiĝon al sentvoluptemo, al malliberulo ŝlosita en mallumo punejo.

[5]) „Kiuj estas laŭ korpo, komprenas tion, kio estas de l' Korpo . . . . La saĝeco de la karno estas morto, kaj saĝeco de la spirito estas la vivo kaj paco.” (S-ta Paŭlo al Romanoj V.)

nima indiferenteco rilate al vero kaj virto.[6]) Kaj tio precise klarigas al ni, kial multaj daŭras en malkredo ĝis la morto mem. La sentvoluptemo ja fortiris anglan reĝon Henrikon VIII de Eklezio! ĝi ankaŭ apostatigis Montanus'on, Luter'on, Zvingli'on, Octrini'on kaj en niaj tempoj la faman karmelitan patron Hiacinton (Karolon Loyson) kaj aliajn.

Hodiaŭ la sentvoluptemo disvastiĝegis en la mondo, kiel atestas ĉi tiu terura plimultiĝo de pornografiaj revuoj, pentraĵoj, kaj ilustritaj poŝtkartoj — ĉi tiu hontinda trolaŭdado de eksedziĝoj farata de kelkaj verkistoj, de libera amo, adultero, kaj sodomio — ĉi tiu senhonta senbrideco en tiel nomataj orfeoj, kabaretoj, kaj tingl-tangloj de grandaj urboj — ĉi tiu pli kaj pli disvastiĝanta komerco de la „viva komercaĵo" t. e. de junaj knabinoj, eksportataj ĉefe de hebreoj kaj vendataj al lupanaroj — ĉi tiu fine protektado de la prostituo por batale akiri al ĝi honoron kaj iujn rajtojn en la socio. Do ne estas mire, ke hodiaŭ tiom da junaj homoj perdas bonajn morojn, kaj kun ili kredon, ĉar sur la marĉejo de malĉasteco (senbrideco) plej abunde elkreskas la herbaĉo de l' ateismo. Kial tio okazas, ne estas malfacile klarigi. Ĉar kiu tutplene submetiĝis al malĉasteco, kaj fariĝis ĝia sklavo, tiu facile altrudas al si mem opinion, ke Dio ne ekzistas, por ne timi Lian punon nek forlasi pekon. Ho! donu Dio! ke ĉiuj ekmemoru belajn vortojn de Plato: „Kiu submetiĝas al sentvoluptema pasio aŭ al koleremo, tiu ne havas aliajn

---

[6]) Bele diras pri tio Aŭgustino Nicolas en „Etudes phil. sur le Christianisme. V. I. Préface (Trad. pola de Zamojski 1853.) „Ĉe multaj ĉesis senbridaĵoj, estingiĝis; tamen la malkredo ĉiam plenigas intelekton; sed kio estas en tio mira? La intelekto iom post iom akceptas kaj fine konserve detenas la alkutimiĝojn de la koro. La animo, unufoje malriĉigita kaj malheligita per pasioj, konservas la vantecon kaj mallumon, kiujn kaŭzas eraroj kaj superstiĉoj nutrantaj ĝin. Kaj ni aldonu al tio. ke la homtimoj kaj spirita maldiligenteco ĉiam staras ĉe sojlo de nia animo, por bari al ĝi revenon al la kredo, kion oni ne povas sen ia distingiĝado kaj precipe sen prenado sur sin de tiuj ŝarĝoj, de kiuj dependas ĝia konserviĝo, kaj tiuj virtoj, kiuj ĝin akompanas".

pensojn, ol malvalorajn kaj mortportajn; kiu ree pro la amo al vero penadas pensi pri senmortecaĵoj kaj Diaj aferoj, tiu atingos la senmortecon kaj feliĉon pro tio, ke li konservadis en si tion, kio estas de Dio, kaj portadis Dion en sia animo" (Timaeus). Ho! donu Dio! ke precipe ĉiu junulo, turmentata de la tentoj kontraŭ kredo, alprenu al sia koro la vortojn eldiritajn de beata Johano Maria VIANNEY, paroĥestro el Ars al iu malĉastulo: „Malobeu la pasiojn, kaj morgaŭ vi fariĝos kredulo"! — Verigis tion en si mem kaj priskribis la franca poeto Francisko COPPÉÉ († 1908) en belega libro s. t. „La bonne souffrance". Jen lia konfesaĵo: „Oni estis edukinta min kristane; pro tio mi dum kelkaj jaroj, post kiam mi ricevis unuan sanktan Komunion, plenumadis sincere kaj fervore religiajn devojn. Pli poste estis alie, sed mi konfesas malkaŝe, ke tio devenis sole el miaj moralaj falintaĵoj (malvenkiĝoj), en kiujn implikis min la junaĝa pasio, kaj la honto malpermesis al mi leviĝi el ili. Ne! Tiom da homoj malproksimigas de Eklezio, kaj deturnas ilin de Sankta Kredo nenio alia, krom la jugo de ordonoj, kiun Sankta Eklezio en nomo de Plejaltulo deziras meti sur iliajn sentojn. Tiel estis kun mi, tiel estas ankaŭ kun ili. Ili nur diru sincere kaj konfesu, kion ili sentas en koro. Poste, jam post malvenkiĝo, ili serĉas — same kiel mi — en scienco argumentojn kontraŭ kredo, ĉar ili volas tiamaniere liberiĝi de la jugo almenaŭ antaŭ propra konscienco. Tio estas vera, sed tio — mi ripetas — okazas nur post malvenkiĝo, ne antaŭe! Do enirinte jam unufoje sur falsan vojon, mi eniĝadis pli kaj pli, mi legadis perversajn librojn, mi aŭskultadis malpiegajn parolojn, mi rigardadis malnoblajn ekzemplojn, ĉar mi penadis krei en mi mem konvinkon, ke la idealo de l' homo estas nenio alia, krom la kontentigo de la fiereco, kaj satigo de la sentvoluptemo. Fine je fino de miaj vivtagoj, la suferado vizitis min. Tiam S-a Dio rigardis min per okulo de Sia senfina mizerikordo, min, kiu en feliĉaj tagoj de vivo mia tiel treege trouzadis Liajn abundajn donacaĵojn, ke mi rekomencis kredi kaj denove preĝi. Oni konsilis al mi legi Sanktan Evangelion. Alnajlita al

dolorlito mi legadis ĝin kaj relegadis dum semajnoj kaj monatoj. Ĉiu vorto de Sankta Skribaĵo komenciĝis en mi iom post iom viviĝi, ĝis fine ankaŭ mi reviviĝis! Jen! En ĉiu vorto de Sankta Skribaĵo mi vidis la veron lumanta kiel suno kaj mi sentis, ke ĝia lumo pli kaj pli trapenetras mian koron"!

Krom pasioj kondukas al malkredo ankaŭ *la nekono* (nescio) *de la religio.* — Hodiaŭ oni lernas multe, legas multe, esploras multe, kaj la mondo estas surŝutita per libroj kaj klerŭloj. Ĉiu branĉo de homa scienco havas siajn adorantojn pretaj por grandaj sindonemoj. Ja pro la scienco unuj perdas okulojn super pergamenoj, aliaj frostiĝas en nordaj glacioj, aliaj sufokiĝas en aeroplanoj — unika nur religio rajtas plendi, ke ĝi estas malzorgata de multaj, kaj jen tiu, sen kiu neniu povas helpi al si, ĉar de ĝi dependas sortoj de la vivo kaj eterneco. — En la familia edukado la religio ne ĉiam okupas la decan lokon, kaj eĉ okazas, ke la gepatroj infektas sian idaron per indiferentismo, aŭ ke la skeptika patro detruas tion, kion konstruis pia patrino. El institutoj (lernejoj) estas hodiaŭ malfacile ricevi pli profundan konon de religiaj veroj, kaj ankoraŭ pli malfacile la amon al pia vivo, — okazas ofte, ke tiu aŭ alia instruisto eĉ donas malbonan ekzemplon (skandalon) al siaj lernantoj per vorto aŭ vivo. La junularo vere lernas religion, sed plivole pro timo ricevi malbonan-noton, vizitas preĝejon kaj konfesas pekojn, sed malofte el propra volo; kiam ree ĉesas devigo, ĝi tuj komencas trouzi la „oran liberecon". Tiam ofte la Sinjora preĝo forflugas el memoro de junularo. Ĝi vizitas preĝejon kutime nur por trarigardi la ĉeestantaron, kaj venigi ĝin por fari sanktan konfeson estas tre malfacile; pro tio okazas, ke tiaj junuloj ne renkontas sin kun sankta konfesejo pli frue ol antaŭ sia edziĝo!

En pli posta vivo la malbonaj inklinoj, malbonaj societoj, malbonaj libroj alŝovas multon da duboj kaj riproĉoj, sed kiom malmultaj estas tiuj, kiuj volus profunde kleriĝi en aferoj de la Kredo! „Sen laboro kaj anima streciĝado

— diris Malebranche — ni ne povas klare ekkoni la veron, ĉar ni estas pekuloj destinitaj por fruntŝvite perlabori panon ne nur por korpo, sed ankaŭ por animo t. e. la panon de la vero"; dume multaj homoj evitas ĉi tiun laboron, pro tio veriĝas en ili la frazo de Pascal: „Religio estas tiel granda afero, ke tiuj, kiuj ne volas peni por ĝin pli bone ekkoni, estadas juste forigitaj de ĝi." (Pensées sur la Religion. T. II chap. 17.)

Kaj kia estas kaŭzo de ĉi tiu indiferenteco?

a) Jen unuj *konsideras religion kiel aferon de la sento*, do oni devas ĝin — ili opinias — lasi al malkleruloj, bezonantaj ankoraŭ ĉi tiun stimulon aŭ bridilon, kaj al virinoj dezirantaj senthavajn impresojn; dume la klera homo devas agi unike laŭ intelekto kaj ne atenti dogmojn kaj eksterajn formojn (ceremoniojn). Ili vere demandas iafoje kiel Pilato: „Kio estas la vero?" sed ili same kiel Pilato ne atendas respondon, kontentiĝante per la ŝajna filozofio de la vivo, kio estas nenio alia krom malprofundeco de spirito kaj malsublimeco de la sentoj. „Multaj opinias — diris ĝuste Manzoni — ke ĉi tiu indiferenteco estas la frukto de profundaj esploroj kaj de alta kleriĝo, ke ĝi estas la lasta kaj plej terura malamiko de religio, venanta ĉe fino de tempoj por efektivigi la venkon, preparitan de tiom da antaŭaj bataladoj, sed estas tute alie"! Male! la indiferenteco estas la *unua malamiko*, kiun kristanismo renkontis en sia triumfplena marŝado tra la mondo. Jam tuj ĉe sia ekapero la kristanismo estis tiel malestimata, ke oni interesiĝon pri ĝi ne konsideris kiel peninda. Apostoloj proklamas al mondo instruojn destinitajn por esti lumo, nutraĵo kaj konsolo al plej sublimaj mensoj; ili eĉ fondas fundamentojn por nova civilizacio aliformigonta Eŭropon kaj tutan mondon, — kaj jen oni opinias, ke ili estas ebriaj. Sankta Paŭlo disvolvas antaŭ areopago la verojn starigontajn klerecrilate la plej malkleran virinon sur pli alta piedestalo, ol staris la plej saĝaj inter saĝuloj de l' antikveco — kaj dume saĝuloj respondas, ke ili lin alifoje aŭskultos. Ili opiniis, ke ili devas pensi pri pli gravaj aferoj, ol pri Dio, homo, animo kaj

animsavo. Same procedis Festus, roma starosto, kiu, aŭskultinte instruon pri „redempcio" ekvokis: „Vi freneziĝas Paŭlo!" La sama malamiko kiu komence kontraŭstaris kristanismon, same ankaŭ hodiaŭ kontraŭstaras, ĉar Eklezio ne estas recevinta promeson, ke ĝi nuligos ĉiujn malamikojn, sed ke ĝi ne estos venkita de ili (Manzoni: Osservazioni sulla Morale cattolica. Prato 1841).

b.) Aliaj ne klopodas por ekkoni religion, ĉar *ŝajnas al ili, ke ili ĝin konas perfekte*, kvankam ekzistas multegaj eraroj en iliaj mensoj, kaj iafoje eĉ dika nescio de katekismo. Ili estas homoj duone instruitaj, kaj krom tio, kiel estas kutime, arogantaj, kiuj sorbis iomete el fonto de la scienco, kaj tio narkotis ilin, malpermesante al ili percepti veron. Por konservi simplecon de la kredo, ili estas por tio tro fieraj; por ree akiri profundan konvinkiĝon, por tio mankas al ili la amemo al la vero kaj al serioza laboro. — Ĝuste diris iu verkisto: „Religiaj demandoj apartenas al plej delikataj kaj plej malfacilaj aferoj, kaj dume nur pri ili kaj pri politiko ĉiuj konsideras kiel ebla kaj oportuna disputi senprepare. Ekzemple pri katolika kredo: Ŝajnas, ke ĝin esplori estas tre facila afero, ĉar ĝi estas la publikaĵo por ĉiu; kaj tamen ni legu kelkajn verkojn de scienculo eĉ fama, kaj certege ni trovos en ili multe da asertoj koncernantaj katolikan religion, kiuj estas absurdaj kaj falsaj!! Tiaj homoj kutime kreas al si mem propran religion, kaj altrudas al si kaj al aliaj opinion, ke ili estas trovintaj la veron, kaj dume ili nur observas blinde proprajn fantaziaĵojn. — Ĉi tiu nekono de katekismo kaj vera filozofio estas la kaŭzo, ke ĉe ni kaj eksterlande la kleraj homoj entuziasmiĝas facile per erarigaj teorioj de monismo, darvinismo, modernismo kaj liberalismo, kaj eĉ entuziasmiĝas al utopioj de okultismo, spiritismo, buddismo kaj teozofio aŭ socialismo aŭ framasonismo. Verdire! kaj hodiaŭ troviĝas ne malmultaj scienculoj, al kiuj povas esti aplikataj trafaj vortoj de Bacon, ke kiu nur iomete ekgustumis filozofion, tiu povas inklini al ateismo, sed kiu faris pli plenan gluton, tiu revenas al religio." („Leves gustus in philosophia movere fortassis ad

atheismum, sed pleniores haustus ad religionem reducere").

— En pli modernaj (lastaj) tempoj oni ekuzis ĉefe la natursciencon kiel armilon por kontraŭbatali la rivelitan religion; ĉar oni ne povas nei — ĝuste diras PASSAVANT — ke la ukuflanka esplorado de naturo povas facile alkonduki al naturalismo kaj determinismo pro tio, ke la naturo en si mem konsiderata, aperigas pliparte la leĝon de nepreco" (Vermischte Aufsätze § 98.) Kiu tamen konscience ekzamenas la naturon, tiu vidas en ĝi Dion, kaj admiras Lian Saĝecon. Pro tio ne estas mire, ke la plej eminentaj natursciencistoj respektegas la religion. [7]) Vere el rondo de darvinistoj kaj pozitivistoj elflugas pli kaj pli freŝaj sagoj kontraŭ religio, ĵetataj kvazaŭ je nomo de scienco, sed tuj aliaj kaj konscienchavaj naturesplorantoj ekkontraŭstaras por defendi ofenditan veron. [8]) — Kiel do trafaj estas la vortoj de hispana filozofo Jakobo BALMES (†1848): „Katolika religio tute ne bezonas timi la sciencon, kontraŭe, ĝi des pli profitos, al ju pli profunda esploro oni ĝin submetos. Ĝi posedas nenian malpuraĵon por kovri ĝin, nek erarojn por kaŝi ilin, ke ĝi devus sin kondamni je vivo en mallumo kaj eviti iun renkontiĝon kun sciencoj!! Kion religio ne toleras? jen: blindan antaŭjuĝon irantan pare kun ignoreco!

— Aliaj ne konas religion, ĉar *ili ne havas tempon por pensi pri ĝi.* Mondaj eksteraĵoj absorbas ilin tutplene, la ĉiutaga vivo entiras ilin en sian turniĝon tiel, ke penso alnajlita al tero ne povas leviĝi super ilian domon, oficejon,

---

[7]) Inter protestantaj scienculoj estis kreduloj Kepler, Euler, Neuton, Herschel, Cuvier, Linné, Humphry, Davy, Quenstedt, Murchison, Liebig, Faraday, Lyell, A. Vagner, Agassitz, kaj aliaj.

[8]) Estas inde citi ĉi tie testamentajn vortojn de la mondfama itala ĥirurgiisto Porro (†1902) „Ju pli ni klopodas por esplori kaŝaĵojn de la naturo, des pli ni malkovras postsignojn de la senfina Saĝeco kaj de la Kreinto, des pli stulta montriĝas al ni aserto, ke la hazardo, ke la naturo okazigis ĉi tiun mirindan harmonion, kiun ni admiradas ĉie tutegale en la bruta kiel en vegetaĝa kaj senorganika regno."

katedron, metiejon, por forflugi en sferon de la Kredo. Ĉi tiuj homoj posedas iafoje sufiĉe da religia sento, sed ĉi tiu sento surŝutita per polvo de negocoj, klopodoj, distroj kaj amuzoj pigmeiĝas kaj pereas, kiel arbeto ne havanta fertilan teron, kaj ilia intelekto facile enprofundiĝas en la dubon kaj malesperon. Al ĉi tiu kategorio apartenas homoj, kiuj ekster la sciencbranĉo, pri kiu ili okupiĝas, nenion vidas kaj nenion volas vidi. Por ili religio preskaŭ ne ekzistas. — Aliaj fine ne volas interesiĝi je religio *por ne ĉesigi al si agrablan tempon de la vivo*. Ili estas ordinare sibaritoj dezirantaj vivi komforte kaj senzorge, ili estas la intelektoj malsublimaj kaj viriniĝintaj (delikatiĝintaj kiel virino), kiuj simile al strigoj malŝatas lumon, ĉar la lumo ofendas ilian okulon, ne rigardantan supren super la tero kaj alŝovas al ili seriozajn pensojn kaj devigas ilin labori por sia beno, kion ili ja evitas. — Pro ĉi tiu nescio okazas unuflanke la antaŭjuĝoj kaj falsaĵoj, kiuj kiel densa nebulo kovras pli ol unu animon tiel, ke radioj de la vero ne povas ĝin enpenetri. [9])

Ho! kiom malmultaj homoj konas Dion kaj Lian naturon! pro tio ili opinias pri Dio laŭ sia plaĉo. Ho! kiel malbone ili komprenas la rakontojn de la Sankta Skribaĵo kaj grandajn misterojn de la Enkarniĝo, de la Redempcio, Altaro! pro tio ne estas mire, ke ili ne traiĝas per deca honoro al ili; kaj kiuj estas perdintaj kredon, vidas en ili nurajn simbolojn, legendojn kaj mitojn. Kiom da erarplenaj ideoj pri dogmoj kaj eklezia historio estas dissem-

---

[9]) La deflankiĝoj de la intelekto — ĝuste diris Moigno (Splendeurs de la foi. V. I. pa. 76.) — estas senkompare pli malutilaj ol deflankiĝoj de la koro, ĉar la senmoraleco, kvankam ĝi estas granda malbonaĵo, tamen ne estas nekuraciĝebla malbonaĵo, se nur la intelekto ne perdus konfidon al kuracilo kaj ne suprenigu malbonon kiel sistemo. Pli frue aŭ pli malfrue rezultos el la trouzo la trosatiĝo kaj eksonos konsciencriproĉoj. Se ree la intelekto devojiĝis kaj perdis senton de la vero, se la fundamentoj mem de la Kredo estas ŝancelitaj, la principoj mem estas kurbigitaj tiel, ke malbono estas konsiderata kiel bono, kiel do povas efektiviĝi la konvertiĝo sen miraklo?"

intaj la verkistoj el kontraŭa rondo! Kiom da falsaj opinioj cirkulas eĉ inter katolikoj mem, pri la neerarebleco de Papo, pri Sankta Inkvizicio, pri monaĥaro kaj precipe pri Jezuitoj! Kiom da kalumnioj ĵetegas senĉese la kontraŭkatolikaj skribaĵoj adrese al pastraro katolika! kaj la mondo kredas tion, ĉar la mondo volas esti trompata! —Aliflanke la nescio de la religio kondukas al ĝia malŝato, kaj malŝato al malestimo; ĉar tia estas la homa naturo, *ke oni tion ne ŝatas, kies valoron oni ne konas*. Verdire! Kiu ne pensas pri Dio, ne konsideras Liajn leĝojn, ne deziras Liajn rekompencojn kaj ne timas Liajn misterojn, ne admiras Liajn verkojn, ne observas Liajn punojn, al tiu religio fariĝos unue fremdaĵo, poste nebezonaĵo, fine netolereblaĵo tiel, ke li ĝin facile vendos por kadukaj mondanaj bagateloj, same kiel tiuj sovaĝaj insulanoj vendadis oron por vitroperloj. Precise ĉi tiu maldiligenteco de animo estas la kaŭzo, ke kelkfoje homoj cetere honestaj, malavaraj por malriĉuloj, sindonaj al familio, diligentaj en plenumado de la devoj, nur en aferoj rilate al Dio estas nezorgemaj tiel, ke ili ne pli frue ol en la horo de morto kaj de Dia juĝo rekonsciiĝas, kaj bedaŭrinde ili ofte ne rekonsciiĝas, se la morto subite tratranĉas fadenon de ilia vivo.

— Fine al la malfortigo de la kredo kondukas la *malplenumado de religiaj praktikoj*. Katolika religio enhavas ne nur la dogmojn, sed ankaŭ ordonojn, kiuj apogas sin sur dogmoj, kiel la konstruaĵo sur fundamento. Kiu do malobservas ordonojn, tiu malfortigas en si la kredon pri dogmoj; kiu malfaras la preĝon, tiu facile forgesas pri Dio; kiu evitas konfeson de la pekoj, al tiu ĝi facile ŝajnas ne tolerebla jugo, kaj eble eĉ homa elpensaĵo; kiu ne ĉeestas sanktan Meson, ne alpaŝas al Sinjora Tablo, tiu perdas honoron kaj amon al Plej Sankta Sakramento; kiu preterlasas la fontojn de la graco, tiu falas en naturalismon, nomanta fantaziaĵo ĉion, kio estas supernatura. Jezu—Kristo diris: „Kiu faras veron, alvenos al lumo" (Ev. de S. Joh. III. 21); do kiu ne faras veron, enfalas en

mallumon. Ho! donu Dio! ke ĉiuj, kiuj estas perdintaj sian kredon, ekmemoru bone la vortojn de filozofo PASCAL: „Vi komencu nur per la praktikado! Vi ĉeestu Sanktan Meson, vi krucosignu vin per benita akvo, kaj la kredo venos poste!" — Bedaŭrinde la neglektado de la religiaj praktikoj okazas sufiĉe ofte eĉ ĉe la homoj, kiuj volas esti opiniataj kiel bonaj kristanoj. Kaj kio estas kaŭzo de tio? Jen unuj malmulte ŝatas ĉi tiujn devojn; kaj tamen ĉi tiuj devoj estas kvazaŭ radikoj, per kiuj religia vivo komenciĝas en animo. Aliaj senkulpigas sin per amaso da okupadoj, oficaĵoj, lernejaĵoj, komercadoj k. t. p. dume ili multe da tempo pasigas je mallaborado kaj vanaj amuzadoj; ĉar kiom da momentoj englutas la legado de ĵurnaloj, romanoj, la eleganta sinvestado, vizitado de teatroj, kazinoj, k. t. p.!

— Aliaj grumble plendas, ke ĉi tiuj devoj estas tro multaj kaj malfacilaj (pezaj); sed ĉu malfacile estas dediĉi ĉiutage kelkajn minutojn por preĝi, en dimanĉoj kaj festoj duonon da horo por ĉeesti Sanktan Meson, kelkafoje aŭ almenaŭ unufoje en jaro ian horon por purigi konsciencon aŭ ankaŭ ekobservi tiel tre moderigitajn fastojn? Ne! la vera kaŭzo de tio estas la maldiligenteco, la viriniĝeco (anima delikatiĝo), la abomeno al ĉia sindonemo kaj la amemo de la memvola letargio de la animo. La maldiligenteco estas ankaŭ la kaŭzo, ke homoj eĉ kreduloj ne malofte estas malzorgaj en plenumado de piaj praktikoj, kaj precipe en ricevado de Sanktaj Sakramentoj de la Pento kaj Altaro.

— Ĉi tiuj faktoroj estas ankoraŭ la kaŭzo, ke en pola socio la pulso de religia vivo ne batas tiel forte, kiel ĝi devus kaj povus bati. Vere ĉe ni la rondo de malkreduloj ne estas tiel multnombra kaj arigita kiel aliloke, sed aliflanke ekzistas ne tre multaj homoj kun fortaj katolikaj principoj, kiuj estus ĉiam kaj ĉie fidelaj al ĉi tiuj principoj t. e. en privata kaj publika vivo, hejme (en familia rondo), en lernejo, en parlamento kaj kie ajn, malmultaj homoj kun fervora koro, kiuj eksentus ĉiujn ĝojojn kaj

dolorojn de la Eklezio, kaj kiuj estus por ĉia religia afero inklinemaj al sindonemaĵoj — malmultaj homoj de apostola spirito, kiuj dankante pro graco de kredo penadu altiri aliajn al Dio. Nome, ĉe ni ekzistas malmulte da fervoro por gloro de Dio kaj por prospero de Eklezio! Jen Eklezio suferas multe ankaŭ hodiaŭ, Lia Papa Moŝto estas senĉese premata de malamikoj, malpiaj sektoj en Romo mem senhonorigas religion kaj ili pretiĝas al rabieca kontraŭbatalo tra la tuta mondo; kaj kelkaj rigardas tion indiferente, aŭ kio estas pli malbona, ili vundas la Sanktan Seĝon per maljustaj riproĉoj.

La oferdonemo por sanktaj aferoj estas ĉe ni malmulta. La sankta Petr-groŝo, la eksterlandaj misioj, la klereco, katolika presaro, asocioj kaj bonfaraj institutoj, preĝejoj k. t. p., jen aferoj etendantaj al ni kvazaŭ manon por almozo, dume la groŝo fluas por ili sufiĉe avare. Sed eble dirus iu, ke oni ĉie sentas mankon da groŝo! Certe, efektive tio estas vera, sed ankaŭ tio estas vera, ke ne ekzistas katoliko, kiu ne povus iomete oferdoni, se li nur moderigus siajn elspezojn kaj posedus malavaran (inklineman) koron!

La kristana kuraĝo estas ĉe ni malmulta! Iafoje la arogantaj aŭ facilanimaj homoj kuraĝas en societoj, dum interkonsiliĝaj kunvenoj kaj en ĵurnaloj ĉikani la misterojn de la kredo, primoki religiajn ceremoniojn, kalumnii pastraron, kaj neniu ekzistas, kiu kuraĝus defendi la veron, ĉar la homa timo aŭ malgrandanimeco fermas buŝon al ili. Eĉ troviĝas homoj, kiuj en ĉeesto de malbonuloj imitas ilin en malbono, ĉar ili timas mokon el flanko de tiuj. — Aliaj ree timas aperigi siajn katolikajn sentojn, ekz. partopreni en procesioj, ricevi publike Sanktajn Sakramentojn, aniĝi al ekleziaj korporacioj, asocioj, ke oni ilin ne famigu kiel fanatikuloj, bigotuloj aŭ bigotulinoj. — Aliaj ree la fiereco kaj volonto distingiĝi (diferenciĝi) de simpluloj haltigas de la partoprenado en piaj praktikoj; dume niaj reĝoj Johana Kazimiro, Johano Sobieski publike kuŝadis krucforme antaŭ altaro — Zigmunto III — Ladislav Jagiello kisis teron dum la Transsubstanciacio —

la reĝoj kaj reĝinoj pilgrimadis al Jasna Góra (Hela monto) kaj al aliaj sanktejoj — gloraj hetmanoj kaj grandaj pensuloj ne hontadis recitadi rozarion. Do kia konkludo fluas el tio? Jen estas necese alte ŝati kaj varme ami katolikan religion, kaj pro tio zorge konservi en animo lumon de la kredo, vivante vere katolike, kaj evitante atente tion ĉion, kio estingas aŭ malheligas ĉi tiun lumon, kiel ekz. la malbonajn farojn, malbonajn inklinojn, malbonajn librojn, malbonajn societojn.

Precipe la junularo devas eviti homojn dissemantajn falsaĵojn aŭ disvastigantajn moralan korupton, homojn, kiujn per tiel fortaj skizoj priskribis J. J. ROUSSEAU, kvankam li mem apartenis al ili: „Forkuru — jen liaj vortoj — de tiuj, kiuj sub preteksto klarigi naturon, ensemas en homajn korojn la malfeliĉigajn doktrinojn, kaj kies ŝajna skeptikeco estas centfoje pli aserta kaj dogma, ol firma kriado de kontraŭuloj. Sub fiera preteksto, ke ili solaj posedas lumon, veron, kaj bonvolon, ili submetas nin al siaj firmaj verdiktoj kaj penas altrudi al ni kiel principaj fundamentoj de ĉiuj aĵoj la nekompreneblajn sistemojn, kiujn konstruis ilia fantazio. Cetere ili renversante, piedpremante kaj detruante ĉion, kion la homoj honoras, deprenas al la afliktitoj la lastan konsolon en ilia mizero, al granduloj kaj riĉuloj la unikan bridilon de iliaj pasioj; ili elŝiras el profundejo de koro riproĉojn pro iliaj krimoj, forprenas al virto esperon, kaj ili krom tio fanfaronas, ke ili estas bonfaruloj por la homaro. Neniam malutilas la vero al homoj!" (Emile etc. V. III p. 197, édit. 1762.)

Se iu malfeliĉe estas enfalinta en nokton de la dubo, aŭ — kio estas pli danĝera — en nokton de malkredo, li penu kiel eble plej frue reveni al lumo; la vojon ree montras al li unu el la plej grandaj saĝuloj de l' homaro t. e. Sankta Aŭgustino. Li en junaĝo serĉis la veron, sed deflankiĝinte de la sole certa vojo eniris en la erarvojojn de maniĥea herezo. Erarojn sekvis malbonaj faroj, malfeliĉan junulon ekregis la sentema pasio kaj ekkatenis lin. Li ĝemis dekkelkajn jarojn en ĉi hontinda mallibereco,

baraktis je ĉiuj flankoj kiel besto kaptita en kaptilojn; fine li decidis forĵeti erarojn, ĉar la predikoj de Sankta Ambrozio montris al li vojon al vero, kaj samtempe la larmoj de lia honorinda patrino Moniko moligis lian koron kaj kompatigis la Ĉielon; nur malfacile estis al li disŝiri la terurajn plektaĵojn de la sentamo. Iun tagon, kiam li tiel bataladis kun si mem, li ekaŭdis la kanton de la knabeto ripetanta ĉi tiujn vortojn: „Tolle, lege” (Prenu, legu). Ĉi-tiumomente li prenas libron de Sankta Skribaĵo, legas ĉapitron el letero de Sankta Paŭlo alvokanta plibonigi vivon, decidas forlasi la estintan konduton, ricevas Sanktan bapton kaj fariĝas ne nur la sankta kristano, sed ankaŭ la hela torĉo de Eklezio. — Simile faru ĉiu, kiu devojiĝinte serĉas la veron, kaj kristanan liberecon. Unue preĝu, ke Dio donu al vi forton por venki vin mem, preĝu precipe je mizerikordo de koro de Savinto, kaj propeto de Tiu, kiun Eklezio nomas la rifuĝo de pekuloj, kaj ankaŭ petu por vi la piaj Monikoj.

Per helpo de Dia graco, kiu abunde spruĉas el Sakramentoj, disŝiru katenojn ligantajn vian animon kaj forĵetu ilin por ĉiam, por ree seniĝi de la antaŭjuĝoj kaj eraroj; „tolle, lege”, legu bonajn librojn, konsultu klerajn virojn kaj aŭskultu Dian Vorton! Kaj kiam per helpo de Dia graco kaj via laboro la lampo de la kredo denove ekflamos, gardu, ke la ventoj ĝin ne estingu; sed lumu ĉi tiu lampo ĝis kiam vi eniros en landon de eterneco!

Pastro Josefo SZUREK
en Lonczki apud Trysztak (Galicio—Aŭstrio).

---

# Bibliografio.

---

*La Biblio. — Tria libro. — Levidoj.*

*El la originalo tradukis D-ro. L. L. Zamenhof.* — Paris, Librairie Hachette et Cie. 2 fr.

La lingvo estas kompreneble ĉiuparte modela kaj majstra. Ni memorigas tamen, ke sen speciala permeso estas mal-

permesata al Katolikoj legadi la biblion en iu vivanta lingvo sen subpaĝaj klarigoj de Katolikaj teologiaj doktoroj.

*Tatterley. — La Historio de Mortinto.*

*Verkita de Tom Gallon, tradukita el la angla lingvo de Andrew Wilson.*

London: British Esperanto Association, 133—136 High Holborn, W. C. 1912. Prezo 0.75 Sm.

Dika libro, du cent paĝa. Interesanta kaj kurioza rakontaĵo por plenkreskuloj.

Kaleb Fry estas egoista maljunulo. Lia servisto, Tatterley, multe similas al li, vizaĝe kaj karaktere — krom la egoismo. Tatterley mortas subite, kaj tuj terura kaprico sin levis en la Kaleb'a cerbo: preteksti la morton de Kaleb, la avarulo, kaj anstataŭi sin mem, kiel la mizera survivanta Tatterley. Tiamaniere Kaleb—Tatterley povos ekscii kiel siaj postvivantoj juĝas lin, kiel sia heredanto, kuzo Hektor Kindon, agados kun sia mono, kiel la senheredigitoj lin malbenos. Tiun-ĉi rolon danĝeran kaj ĉagrenan Kaleb, la nova Tatterley, ludas korekte ĝis la fino. La eksperimentoj de ĉi-tiu dua vivo konvertas plene la egoistan Kaleb—Tatterley. Li fariĝas, — bedaŭrinde tro malfrue — homa, helpema, sindonema, kaj li mortiĝas pentadante sian antaŭan senutilan vivmodon.

*Resumo de la Kurso pri Teologio de la Kavaliro Le Clément de St. Marcq. Tradukis A. Stas*; prezo 8 sd. Anvers 1912.

Malgrandeta broŝureto enhavanta herezajn doktrinojn. Ni eltiras jenan frazon: la Dio de ĉiu eklezio estas do necese iu „parta Dio" kaj konsekvence falsa Dio" — paĝ. 12-a. Niaj legantoj estu avertitaj.

*Deziro de la Diakono. Novelo. El la Ukraina lingvo tradukis Anatolo Koh.* Universala Esperantia Librejo, 10 Rue de la Bourse, Genève 1912, prezo 15 sd., 14 paĝ-a.

Historieto, kiu nur en Rusujo povus okazi. Diakono de la ŝhismatika eklezio, kaj nululo edziĝis virinaĉon. Kelkaj mizerplenaj tagoj de tia paro estas priskribitaj. La traduk-

into, kies portreto dandas en la portalo de l' libreto, ĉirkaŭrigardu kaj elektu verkojn pli indajn kaj plaĉontajn.

*Ivan Turgenev. Fantomoj. — El la rusa lingvo tradukis D-ro Andreo Fiŝer*-Bucuresti, editura Esperanto — 14 str. Belvedere. Danubo no. 1, prezo 0.100 Sm.

Iu Ruso ĉiu-nokte revas ke mistera virino — fantomo — suprenprenis lin en la nuboj kaj tiel lin vizitigis multajn landojn. Ankaŭ en Romo ili venis; la tempo antikva reviviĝas ankaŭ antaŭ liaj okuloj — sed, strange en Romo li ne ekrimarkas Lian Papan Moŝton! Cetere fantaziaĵo sufiĉe naivega!

*Teosofia Esperanto ligo.*

*Oficiala resumo de la teosofia doktrino. El la franca lingvo tradukis Henriette Diou-Trouillon.* Paris, Rue Lacépède 33, 1912, prezo 0.08 Sm.

Ni elcerpas jenon:

„La Teosofia Societo konsistas el studentoj apartenantaj aŭ ne al ia ajn religio praktikata en la mondo.... Ili pensas, ke la fido devas rezulti de la studado aŭ de la intuitivo, ke ĝi devas sin apogi sur la racio, kaj ne sur la parolado de iu ajn." Paĝ. 3-a. — Ni komprenas la aŭtorinon. Kiel pli noble celis alia Fraŭlino — la eminenta Mathilda Borret — tradukante esperanten: Kie estas la Eklezio de Kristo?!

*N. V. Gogol. — Maja nokto aŭ la Dronintino. El la rusa lingvo tradukis Romano Frenkel.* — Bucuresti. Editura Esperanto. 5 str. I. C. Bratianu, prezu 0.200 Sm. 34 paĝ.

Rusa vilaĝa historio. Moroj ne tre delikataj kaj kelkfoje tro da kisado.

*Tri Angloj, alilande.*

*Romano originale verkita en Esperanto de John Merchant.* — Prezo, afrankite, unu ŝilingo ĉe „La Espero" Lynette Avenue, Clapham Common, London S. W. 96 paĝ. 1912.

Amuzanta iomete malserioza historieto pri tri junuloj vojaĝante Francujon, Belgujon kaj Germanujon. Unu el ili malamas virinojn kaj amas Esperanton; la aliaj amas virinojn

kaj neŝatas Esperanton. Estas libro tro supraĵa, tro disigita; la kunligado, la komponado, la kuntenado, la arto mankas; estas tro epizoda por ke ĝi povu esti nomata: romano.

H. LINNEBANK.

*Uden*, Nederlando.

---

# Oficialaj Sciigoj.

## AL LA ABONANTOJ DE E. K.

Sur la kvina paĝo de la verda krovilo mi havas la plezuron daŭrigi la liston de la pagintoj.

Al ili mian sinceran dankon!

Timante tedi vin, karaj legantoj, mi ne faras detalojn, sed simple konstatas fakton: multaj abonantoj devas ankoraŭ pagi por 1912 kaj 1913.

Plenkonfide mi renkontenvidas baldaŭan alsendon de la abonmono.

Responde al diversaj informpetoj pri maniero de pagado, mi sciigas la jenon:

Unue: Prefere pagu per transpagilo de la ĉekbanko Esperantista en Londono.

Monforsendo ĝenerale kostas relative-multe, precipe kiam la sumo forsendota estas malgranda.

Per transpagilo de la Ĉek-banko vi povos forsendi iun ajn sumon, eĉ la plej malgrandan, poŝtkarte, do laŭ la tarifo de eksterlanda poŝtkarto. Uzante tiun tre oportunan rimedon, vi evitos al vi mem ne plu necesajn, relativegrandajn elspezojn;

Due: pagu per internacia poŝtmandato;

Trie: per bankĉeko, respondkuponoj, papermono.

Sed, ĉar je la enkasigo ni kutime perdas nemalmulte, bonvolu aldoni 10% por enkasig-elspezoj.

Kiel ajn vi forsendas la monon, ĉiam skribu vian adreson plej legeble!!

Multaj hispanaj abonantoj skribis al mi:

„Mi deziras pagi, sed sciigu min kiamaniere mi pagi povos?"

Jam de longe mi intertraktas por aranĝi tiun aferon plej kontentige por ĉiuj. En la proksima numero mi esperas definitive solvi tiun problemon.

Ĉar en la Januara-numero aperos tiu respondo, la hispanaj abonantoj nepagintaj por 1913, ne ŝuldos *morale* la abonmonon por 1913, se ili ne deziros daŭrigi, eĉ akceptinte la Januaran numeron.

Kaj fine pli agrabla temo.

Dum la jaro 1912 granda nombro da fervoraj amikoj de „Espero Katolika" (pastroj kaj laikoj) multe laboris por nia kara revuo. Kore, korege, je la nomo ankaŭ de la direktoro-redaktoro, mi dankas pro ilia multvalora, multŝatata kunhelpo. La bona Dio benu ilin miloble!

Jam nun mi povas sciigi, ke dum 1913 ni esperas per *bela premio* alkuraĝigi la propagandon de E. K.

Plenaj detaloj estas publikigotaj en la Januara numero.

La abonmonoj ricevitaj dum la presado, forsendo de E. K. estas publikigotoj en la Januara-numero.

Sincere Via,

La Administranto,

Frans Sleijffers,

93, Prins Hendrikstraat,

Nederlando. Den Haag.

**Anstataŭ la bedaŭrinde ne ricevita oficiala raporto de „Nia Tria", por kiu ni rezervis dudekon da paĝoj, ni donas la por unu numero iom tro longan, sed bonegan artikolon de nia ŝatata kunlaboranto P-ro Szurek.**